

daŭris ĝis 1889. Tiam okazis en Parizo universala ekspozicio. Samtempe okazis la unua kunveno de la Ĝenerala Konferenco. La prototipoj estis aprobataj. La ekzempleroj elektitaj kiel internaciaj prototipoj estis deklarataj kiel reprezentantaj la metron kaj la kilogramon. Ili estis deponataj en la laboratorio de la Internacia Komisiono en Breteuil.

Tiel efektiviĝis la en 1790 oficiale decidita internaciigo de la mezuroj kaj pezoz preskaŭ unu jarcenton pli poste.

Du jarojn antaŭ tiu historia evento okazis io por ni grava; la unua libro de D-ro Esperanto aperis.

Kiel vi jam rimarkis dum mia prelego, la komence donita defino de la metro ŝanĝiĝis. Komence ĝi estis la dekmilionono de la termeridiankvadranto. Sed nun ĝi estas la longo de mezurilo konservata en Breteuil. Analoge estas kun la kilogramo, unue difinita kiel pezo de kuba decimetro da akvo kaj pli poste kiel la pezo de la prototipo en Breteuil. Oni do forlasis kvazaŭ nerimarkite la originan intencon krei naturajn unuojn. Sed la unuoj difinitaj per la prototipoj fariĝis internaciaj.

Kaj nun reviviĝas la ideo, kiun ni jam rimarkis ĉe Mouton en 1670. Li volis kontroli sian unuon prenitane el terdimensio per la longo de la sekundpendolo. Nun oni intencas kontroli la longon de la prototipoj per alia rimedo sendependa de la situo sur la terglobo kaj pli precize reproduktebla. Tio estas la longo de lumondo de difinita frekvenco, kiun oni trovas en la linioj de la emisijaj spektroj de gasoj. Tia lumondo uzata en la metrologio devas havi kiel eble plej difinitan frekvencon, alivorte ĝia lumo devas esti kiel eble plej monokromata. Ne ĉiu spektra linio respondas sufiĉe al tiu postulo. Kun tiu intenco oni jam fine de la pasinta jarcento studadis la tri ĉefajn liniojn de la kadmia spektro, kiuj ne perfekte kontentigis la postulojn de la metrologio. Poste oni trovis, ke la verda linio de taliumo kaj la ruĝa linio de zinko estas pli monokromataj. Sed la progreso de la kemio alportis novan lumon al tiu demando: la naturaj kemiaj elementoj estas miksaĵoj de izotopoj. Tio malbone influas la monokromatecon de la spektraj linioj. Tial oni volas nun uzi la liniojn de elementoj konsistantaj el nur unu izotopo, de monobaraj elementoj, kiujn oni nun povas prepari, kvankam malfacile<sup>4)</sup>. Oni nun esploras la kripton-izotopojn 84 kaj 86 kaj la hidrarg-izotopon 198.

Pri tio diskutos septembron 1953 internacia komisiono por ellabori proponon por la Ĝenerala Konferenco por Pezoj kaj Mezuroj, kunvenonta denove en 1954. La sciencisto, kiu donis al mi tiujn informojn kaj kiu mem partoprenis en la komisiono en Parizo, atentigis min, ke tie diskuto estos nur tiom ebla, kiom permesos la lingva diverseco.

Alia demando, kiu aktualiĝis iom post iom sekve de la progreso de la fiziko, temas pri la uzado de la vorto „pezo”. Vi aŭdis min ĉiam paroli pri

<sup>4)</sup> J. Stulla--Götz: Fortschritte der Metrologie. Wissen der Zeit, 3 Nr. 5.

pezo kaj la fizikistoj inter vi rimarkis, ke tio ne estas korekta, ĉar temis ĉiam pri maso. Tion deklaris la unua Ĝenerala Konferenco por Pezoj kaj Mezuroj kaj la tria konferenco en 1903 aldonis: „La vorto pezo signifas grandon de sama speco kiel forto.” Do la kilogramo estas ekskluzive unuo de maso. Tiu decido de la Konferenco iniciatis ĉe la membroŝtatoj de la Konvencio novredakton de la koncernaj leĝoj. Tio necesigas novan nomon, se temas pri la pezo de unu kilogramo, pri la forto, per kiu ĝi estas tirata teren. Oni uzas ofte por tio la terminon „kilopondo”, kiel ekzemple en la aŭstria federacia leĝo de 1950. Eble tiu termino internaciigos.

Alia praktike gravega tereno por la metra sistemo estas la elektro. Ĝiaj unuoj baziĝas sur ĝi. Ĝuste en la determino de elektraj unuoj por kurento, tensio, rezisto ktp. la metra sistemo montris evolukapablon ne antaŭsentitan de ĝiaj fondintoj. Sed pritrakti tion postulus specialan prelegon.

En tiuj progresoj sur la scienca kampo ni vidas denove, kion ni vidis dum la tuta historio de la metra sistemo, nome pli rapidan evoluon de la teorio kompare kun la socia praktiko. Kvankam jam 56 ŝtatoj devige enkondukis la metran sistemon kaj 33 apartenas al la Konvencio de la Metro, kaj kvankam anglaj sciencistoj plej multe kontribuis al la apliko de la metra sistemo en la elektrosienco, tamen ankoraŭ mankas la deviga enkonduko de la metra sistemo en la Brita Imperio kaj en Usono. Ĝia triumfo do ne jam estas perfekta kaj ne tute plenumiĝis la fiera devizo de ĝiaj fondintoj:

*Por ĉiuj tempoj, por ĉiuj popoloj.*

408.92 : 413

## INVENTARO DE LA FUNDAMENTA KAJ OFICIALA VORTTREZORO

de prof. G. WARINGHIEN

Plurfoje mi havis la okazon konstati, ke la informoj pri la ekzakta konsisto de nia Fundamenta kaj Oficiala vorttrezoro ne akordas inter si, kaj ke pri tiu aŭ alia vorto oni ne scias ĝuste, kian gradon de oficialeco oni devas atribui al ĝi. Tial mi opiniis utila fari detalan inventaron, eĉ se tiu tasko devas aspekti en la nunaj tempoj bagatela kaj seka erudiciaĵo.

### Fundamenteco kaj Oficialeco.

Eble ne estos superflue memori pri la diferenco inter fundamenta kaj oficiala vorto. Fundamenta estas vorto kuŝanta en la „Fundamento de Esperanto”, en kiun libron „neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari ..... iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon” (*Antaŭparolo*, p. V, VI). La fundamentaj vortoj estas do neŝanĝeblaj — eĉ se ili montriĝis poste maloportunaj, aŭ eraraj (*vipuro* estas ekz-e la rezulto de simpla preseraro).

Sed tio ne signifas, ke ili estas truditaj por eterne al la esperantistaro! En la sama Antaŭparolo (p. X) Zamenhof klare diras, ke „se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas *tro neoportuna*, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos *arĥaismo*, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo. Sed, prezentante parton de la *fundamento*, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj .....”. Tiun procedon Zamenhof mem tri fojojn volis apliki, sed ĉiufoje fiaskis antaŭ la opozicio de Cart, kaj eble ankaŭ de Boirac. La Lingva Komitato ĝin neniam oficiale agnoskis, krom pri unu punkto: la korektado de la eraraj nacilingvaj tradukoj en la Universala Vortaro. Cart mem publikigis unue la korektitajn tradukojn en la Oficiala Gazeto (n-roj 43 ĝis 64), kaj poste libroforme (roneotipa eldono, 1914); ilin finfine kolektis (kun pluraj novaj korektoj) Grosjean-Maupin en sia „Oficiala Klasika Libro de Esperanto” — sed nur por la lingvoj franca, angla kaj germana.

Tute male, la oficialaj vortoj estas principe modifeblaj aŭ anstataŭigeblaj, se poste aperus neceso pri tiaj ŝanĝoj. Kion la Lingva Komitato faris, tion ĝi (aŭ la nuntempa Akademio), en okazo de bezono, plene rajtas malfari. Sed tiaj demandoj povos esti konsiderataj nur post la starigo de definitiva inventaro, kio estas nia ĉi-tiea celo.

### La Fundamento de Esperanto.

La *Fundamento de Esperanto*, agnoskita kiel tia de la Bulonja Kongreso, estis aperinta libroforme iom antaŭe, en julio 1905, ĉe Hachette. Ĝi entenas kvar partojn: la *Antaŭparolo*; la *Gramatikoj* en la lingvoj franca, angla, germana, rusa kaj pola; la *Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto*; la *Universala Vortaro*. La *Gramatikoj* estis la reprodukto de la diverslingvaj eldonoj de la „Unua Libro de Esperanto” (1887); la *Ekzercaro* kaj la *Universala Vortaro* estis senŝanĝaj reproduktoj de la samtitolaj libretoj aperintaj en 1894.

Por la analizo de tiu grava dokumento, estos pli oportune iri retropaŝe.

A. La *Universala Vortaro* (= U.V.) entenas kaj komunuzajn vortojn kaj proprajn nomojn (propraj nomoj mi rigardis ĉiujn vortojn presitajn kun komenca majusklo, kun du esceptoj: mi aldonis *Kristnask'*, ĉar la komenca minusklo ŝajnas preseraro — kp *Pasko*, *Pentekosto* —, kaj deprenis *Di'*, ĉar ĉi tie la komenca majusklo ŝajnas nur signo de respekto — kp la proprajn nomojn *Alaho*, *Javeo* ktp). Krome ĝi prezentas ilin sub tri formoj: aŭ de radiko (ekz. *abat'*), aŭ de radikalo (= radiko + afikso, ekz.: *danc'ad'*), aŭ de vorto (= radiko aŭ radikalo + finaĵo, ekz. *hom'a*).

Uzante tiujn distingojn, ni trovos, ke la U.V. entenas:

Komunaj vortoj: 2.612 radikoj, 309 radikaloj, 88 vortoj;

Propraj nomoj: 29 radikoj, 10 radikaloj;

Entute: 2.641 radikoj, 319 radikaloj, 88 vortoj (sume: 3.048).

(Rimarko: mi kalkulis la vorton *dam'o'j* dufoje, kiel radikon kaj kiel vorton, kaj la vorton *fe'in'* ankaŭ dufoje, kiel radikon kaj kiel radikalon).

B. La *Ekzercaro* levas plurajn problemojn:

a) Ĉar ĉiun el la proprediritaj ekzercoj (§ 5 ĝis 42) sekvas listo da vortoj kun kvinlingvaj tradukoj analogaj al tiuj de la U.V., la unue venanta penso estas rigardi fundamentaj nur la tiel difinitajn radikojn. Sed enestas en tiuj ekzercoj aliaj pluraj „internaciaj” radikoj, kiuj ne estas kolektitaj en la suba listo kaj tamen estas difinitaj de la kunteksto (ekz. § 41: „Centimo, pfenigo kaj kopeko estas moneroj” — nur *mon'* kaj *er'* estis tradukitaj). Jen do unua solvota demando:

Ĉu oni rigardu fundamentaj ĉiujn radikojn de la §§ 5 ĝis 42? (1)

b) La 3 unuaj ekzercoj estas ekzercoj de legado (§ 2, 3, 4). Ili entenas plurajn novajn vortojn „internaciajn”, kiuj estas difinitaj nek per traduko, nek per la kunteksto. E. Wackrill, en sia „Konkordanco de Ekzercaro” (1907) ne konsideris ilin. Efektive, oni tie trovas kelkajn strangajn kunmetaĵojn, kiel *packapo*, *traulo* aŭ *neulo*, kaj eĉ preserarojn, kiel *cikano* aŭ *deino* (probable anstataŭ *ĉikano* kaj *feino*), kiujn oni malfacile rezignus rigardi fundamentaj. Tamen la demando devas esti eksplicite solvata:

Ĉu oni rigardu fundamentaj la radikojn de la §§ 2, 3 kaj 4? (2)

c) La unua paragrafo entenas simple la alfabeton, kun la nomoj de la literoj. E. Wackrill enmetis ilin en sia ĉi-supre aludita verko, s-ro N. Kawasaki ne enkalkulis ilin en sia „Radikoj de Ekzercaro”. De tie la tria demando:

Ĉu oni rigardu fundamentaj la radikojn de la § 1? (3)

Provizore, kaj analizante la Ekzercaron nur rilate al la enhavo de la U.V., ni trovas, ke ĝi entenas 932 radikojn<sup>1)</sup>, el kiuj la sekvantaj ne estas entenataj en la U.V. (mi montras post ĉiu radiko interkrampe la numeron de la Oficiala Aldono, en kiu ĝi estis poste registrita):

a) *Ekzercoj 5—42:*

Ordinaraj vortoj 28, el kiuj 10 tradukitaj: *diplomati'*, *doktor* (1), *fi* (1), *fizik'* (1), *prefiks'* (1), *projekt'* (2), *rezultat'* (1), *special'* (1), *sufiks'* (1), *teatr'* (1) — kaj 18 ne tradukitaj: *aktiv'* (1), *centim'* (1), *ĉial*, *ĉies*, *ĉiom*, *diplomati'* (1), *energi'* (1), *ĉiograf'* (1), *kilometr'* (1), *kopek'* (1), *metr'* (1), *milion'* (2), *naiiv'* (1), *nenial*, *neniom*, *pfenig'* (1), *telegraf'* (1), *ties*.

<sup>1)</sup> La cifero de N. Kawasaki: 904, klariĝas, ĉar li ne kalkulis la 28 liter-nomojn; en lia listo, oni anstataŭigu *pasiv* per *patent*.

Propraj nomoj 33, el kiuj 6 popolnomoj (*Franc'*, *German'*, *Hebre'* (1), *Hispan'*, *Pol'*, *Rus'*), 1 nomo de lingvo (*Esperanto*), tri nomoj de urboj (*Berlino*, *Parizo*, *Vaŝingtono*) kaj 23 personnomoj.

Entute 61 radikoj.

b) *Ekzercoj de legado*:

Ordinaraj vortoj 9: *bal'* (1), *geograf'* (1), *jurist'* (1), *patent'* (1), *scen'* (1), *sistem'* (1), *sofism'* (1), *teori'* (1), *zoologi'* (1);

Propraj nomoj 2: *Eŭropo*, *Paŭlino*.

Entute 11 radikoj.

c) *Unua ekzerco*:

Ordinaraj vortoj 29: *alfabet'* (1), kaj la 28 liternomoj.

Entute, en la *Ekzerco* troviĝas do 101 novaj radikoj.

C. La *Gramatikoj* entenas nur 1 novan ordinaran vorton: *tragedi'* (1) kaj 2 proprajn nomojn: *Londono* kaj *Silero*. Entute 3 radikoj.

D. La *Antaŭparolo* efektive ne apartenas al la tri fundamentaj verkoj jam esploritaj, kaj precize elnombritaj sur la paĝo VI de tiu Antaŭparolo mem. Tamen, ĉar ĝi akompanas ilin, oni povas dubi, ĉu la sankcio de la Bulonja Kongreso, aludita sur paĝo XI, ankaŭ ĝin koncernas. Jen do nova tikla punkto:

Ĉu oni rigardu fundamentaj la radikojn de la Antaŭparolo? (4)

Tiuj ĉi konsistas el:

Ordinaraj vortoj 17: *arĥaism'*, *absolut'* (1), *aŭtor'* (1), *aŭtoritat'* (1), *dogm'* (2), *dokument'* (1), *ide'* (1), *instituci'* (1), *kompetent'* (1), *kongres'* (1), *kontrol'* (1), *literatur'* (1), *paradoks'* (2), *paralel'* (1), *princip'* (1), *sankci'* (1), *valor'* (1); propra nomo 1: *Bulonjo*.

Entute 18 radikoj.

Oni vidas nun, kiel malfacile estas decidi pri la fundamenteco de tiu aŭ alia radiko: Grosjean-Maupin ne akordas kun Wüster, pli ol Kawasaki kun Wackrill. Se preni la plej striktan kriterion, la Fundamento entenas 2.641 radikojn; se preni la plej larĝan, ĝi entenas 2.763.

Persone mi emus rigardi fundamentaj ĉiujn radikojn de la tri fundamentaj verkoj, ekskluzive de la Antaŭparolo. Sed tio estas nur privata opinio, kaj estus tre utile havi definitivon de la Akademio pri ĉiu el la ĉi-supre dekstre numeritaj demandoj.

Intertempe, ni devas konsideri antaŭ ĉio la opinion de la tiutempa oficiala instanco, t.e. la Lingva Komitato, ĉar nur tio liveras al ni bazon de objektiva kaj kohera priskribo. Nu, pri tiu opinio povas ekzisti nenia dubo: dum, en la Antaŭparolo de la Fundamento, Zamenhof precize antaŭvidis postan „Aldonon al la Fundamento” (p. X), Boirac kaj Cart titolis tiun kompletigaĵon „Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro”, montrante tia-

maniere, ke ili konscie kaj intence lasas flanke la vortojn entenatajn en la aliaj partoj de la Fundamento.

### La Oficialaj Aldonoj.

Tiu *Unua Oficiala Aldono* (= O.A.) aperis en 1909. Ĝi entenas, kun tradukoj en la samaj kvin lingvoj, kiel la U.V., 864 radikojn, el kiuj 1 sola propra nomo (*Hebre'*). Cetere, ni jam vidis, ke el la radikoj entenataj en la partoj de la Fundamento aliaj ol la U.V., la Unua O.A. reprenis 44.

Sed ankaŭ tiu Unua O.A. rezervas al ni problemon. Sub la vorto *astrolog'* kuŝas efektive jena piednoto: „Same, *agronom'*, *antropolog'* k.t.p.”. Ĉu tio signifas, ke apud ĉiu oficiala radiko finiĝanta per *-nomi'* aŭ per *-logi'* oni devas rigardi ankaŭ oficiala la respondan radikon finiĝantan per *-nom'* kaj per *-log'* kaj montrantan la aganton? Tia senco ŝajnas esti kontraŭdirita de la komenca *Klariga Noto*, kiu asertas: „Oni tute ne intencis doni plenajn seriojn ..... Se, ekzemple, oni citis la vorton „diplomato” kaj ne „diplomatío”, tio tute ne signifas, ke la vorto „diplomatío” ne estas akceptinda. Per analogio oni tute prave uzos ĝin kaj ĝi trovos lokon en alia listo .....” Jen probable, kial Wüster ne konsideris tiun piednoton. Cetere, se oni akceptus ĝin, oni ne vidas, kial ĝi ne taŭgas ankaŭ por la radikoj finiĝantaj per la elementoj *-grafi'*, *-krati'*, *-mani'*, *-mati'*, *pati'*, *-urgi'* kaj *zoŝi'*, al kiuj ankaŭ respondas nomoj de agantoj sen *i* (*geografo*, *demokrato*, *megalomano*, *diplomato*, *homeopato*, *dramaturgo*, *teozofo* ktp.)

Tamen estus dezirinde havi la oficialan opinion de nia Akademio pri tiu punkto, kaj pli precize, pri jenaj tri demandoj:

Ĉu la piednoto de la Unua O.A. signifas, ke ĉiu agantnomo finiĝanta per *-nom'* aŭ *-log'* estas oficiala, se la responde sciencnomo kun *-nomi'* aŭ *-logi'* estas tia? (5)

Se jes, ĉu oni ne devas etendi tiun regulon al la aliaj analogaj pseŭdosufiksoj? (6)

Aŭ ĉu ne estus pli simple oficialigi nur la tiuspecajn agantonomojn kaj krome unu sufikson *-i-*, kun la signifo de „abstrakta sed ne matematika okupigo de la koncerna aganto”? (7)

La *Dua O.A.* aperis en julio 1919. Ĝi prezentas novigaĵon: la radikoj estas ordigitaj en du listoj, tiu de la „internaciaj vortoj, kiuj laŭ § 15 de l' Fundamento estas esperantaj”, kaj tiu de la „komune uzataj vortoj oficialigitaj de la Akademio”. Verŝajne pro la malbono de la tempoj, la unua listo liveras la radikojn sen traduko kaj difino (krom kelkaj notoj), kaj la dua tradukas ilin nur trilingve (france, angle, germane).

La unua listo entenas 480 radikojn, la dua 111 radikojn kaj 2 radikalojn (*tramvojo* kaj *tramveturilo*). Entute 591.

Sed el tiuj, unu jam troviĝis en la Unua O.A.: *prozodi'*; kaj aliflanke la Enkonduko anoncas oficialigon de la sufikso *-ism*. La fina sumo do ne ŝanĝiĝas. (Ni notu, ke 4 radikoj jam ekzistis en la partoj de la Fundamento aliaj ol la U.V.).

La *Tria* O.A. aperis en aŭgusto 1921. Ĝin redaktis Grosjean-Maupin, kiu adoptis kaj principigis la dividon inter „Radikoj pure esperantlingvaj” kaj „internaciaj radikoj”. Ĉiuj estas tradukitaj seplingve (angle, france, germane, hispane, portugale, itale, pole).

La unua listo entenas 61 radikojn, la dua 131, inter kiuj 2 propraj nomoj: *Jesu'* kaj *Jud'*. Sed en tiu dua parto troviĝas la radiko *jur'*, kiu efektive estas nur dismembrigo de la radikalo *jurist'* de la Unua O.A. (jam trovebla cetere en la *Ekzercaro*). Ni do kalkulos por la Tria O.A.:  $61 + 130 = 191$  radikojn.

La 25-an de februaro 1923, s-ro Cart, Prezidanto de la L.K., dissendis al siaj kolegoj „Noton de l' Direktoro por la Komuna Vortaro pri duoblaj formoj en Oficiala Radikaro”. Verdire, temis pri kelkaj formoj oficialigitaj en la Unua (*analogi'*) aŭ en la Tria (*budĝet'*, *Jesu'*, *konfidenc'*, *nekrolog'*) Oficiala Aldono, kaj pri kiuj estiĝis iaj duboj: s-ro Grosjean-Maupin tial proponis al la L.K. voĉdoni pri la alternativoj *analog'* aŭ *analogi'*, *konfidenc'* aŭ *konfidenci'*, *nekrolog'* aŭ *nekrologi'*, *Jezu'* aŭ *Jesu'*, *budĝet'* aŭ *buĝet'*. La 12-an de majo 1923, s-ro Cart dissendis la rezulton de la voĉdono: el 73 anoj, voĉdonis 62, valoris 59; 52 voĉdonis por la formo *analog'*, 53 por *konfidenc'*, 46 por *nekrolog'*, 34 por *Jezu'*; nur 3 voĉdonis kontraŭ *budĝet'*. La plimulto por *Jezu'* ne ŝajnis sufiĉa por fina decido; pri *konfidenc'*, *nekrolog'*, *budĝet'*, nenio estis do ŝanĝita; sed la formo *analog'* estis oficialigita anstataŭ *analogi'*. Kvankam oni poste forgesis enmeti en la Kvaran O.A. noton pri tiu modifo, oni devas do rigardi la formon *analogi'* kiel ne oficialan.

En 1924 aperis de E. Grosjean-Maupin la „Oficiala Klasika Libro de Esperanto”, kiu devus esti aŭtoritata dokumento en nia afero. Sed mi ĝis nun ankoraŭ ne povis ekscii, ĉu ĝi prezentas privatan laboron de la tiama Direktoro por la Komuna Vortaro, aŭ ĉu ĝi estis sankciita de la Akademio kaj de la Lingva Komitato. Ĝi principe rigardas fundamentaj ĉiujn radikojn de la Fundamento, kontraste al la ĝistiamaj O.A.; tamen, pluraj el la radikoj de la *Ekzercaro* ne estas montritaj kiel fundamentaj, aliaj estas enkondukitaj de la (ne-fundamenta!) esperantlingva Gramatiko en la *Fundamenta Krestomatio*, unu eĉ venas oni ne scias de kie (*arog'*); fine, estas kelkaj forgesitaĵoj aŭ preseraroj, kiuj igas tiun libron bedaŭrinde ne fidinda. Mi do ne esploros ĝin pli detale. (En 1927 aperis pli korekta eldono kun itala-hispana-portugala tradukado).

La *Kvara* O.A. aperis en junio 1929. Ĝi prezentas nur unu liston de

118 radikoj, inter kiuj unu propra nomo (*Amoro*). La tradukoj estas donitaj en tri lingvoj: france, angle kaj germane.

La *Kvina* O.A. aperis en junio 1934, redaktita de L. Bastien, kun difinoj en Esperanto kaj tradukoj en ses lingvoj (angle, france, germane, hispane, itale, pole). Ĝi revenas al la tradicio de la du listoj, sed ĉi-foje la distingo estas farita inter la ordinara kaj la teknikaj vortoj. La unua listo entenas 5 radikojn, la dua 3, sume 8.

La *Sesa* O.A. aperis en aprilo 1935, redaktita de W. Bailey. La formo estas la sama, kiel tiu de la Kvina. La unua listo entenas 15 radikojn, la dua 6, sume 21.

Finfine, en oktobro 1953, estis definitive oficialigita la sufikso *-end*.

La sumo de la radikoj oficiale aldonitaj al la U.V. estas do, se kalkulite laŭ la ĉi-supre aplikita metodo:  $1.794$ . Kun la radikoj de la U.V., ni atingas la sumon de:  $2.641 + 1.794 = 4.435$  (inter kiuj 32 propraj nomoj).

#### Ne postkolektitaj vortoj.

Restas unu lasta demando. Se la nuna Akademio decidos obei la tradicion kaj ne modifi la vidpunkton de la antaŭa Lingva Komitato, se sekve ĝi rifuzos atribui la fundamentecon al la radikoj de la Fundamento ekster la U.V., restos la ŝoka fakto, ke 67 el tiuj radikoj ne estas oficialaj, kvankam entenataj en fundamenta dokumento: 36 ordinara vortoj (*arĥaism'*, *ĉial*, *ĉies*, *ĉiom*, *diplomati'*, *nenial*, *neniom*, *ties*, kaj la 28 literonomoj) kaj 31 propraj nomoj (1 nomo de lingvo, 6 nomoj de popoloj, 4 nomoj de urboj kaj 24 persononomoj). De tie la lasta demando:

*Ĉu oficialigi bloke ĉiujn tiujn forgesitajn vortojn?* (8)

Jen do la seka inventaro de la oficiala Esperanto-vortaro. Ĝin oni devis fari — kaj oni devos atendi respondojn de la Akademio al la 8 levitaj demandoj — antaŭ ol ataki la sekvantajn problemojn pri la harmoniigo de tiu vorttrezoro (ekz. apud *paralel'* mankas *perpendikl'* ktp.), pri la pseŭdosufiksoj (ĉu toleri *ekspon'* apud *ekspozici'* ktp.), pri la elekto de pli taŭga formo de kelkaj radikoj (ekz. *budĝet'*, kiu estas ne prononcebla), pri la divido eventuala de tiuj radikoj en du kategorioj, kaj kiaj ktp. ktp. „Estas tempo por detruui, diris la Predikanto, kaj tempo por konstrui”: ŝajnas, ke por ni venis la tempo por kribradi.